# *Fidel, homo de universalaj valoroj, asertis la rusa ministro Serguei Lavrov.*



Moskvo, 29 nov (RHK) Fidel Castro grave kontribuis al garantio morala en la internacia areno, io kio multe mankas nuntempe, deklaris la ministro pri eksteraj rilatoj rusa Serguei Lavrov, kiu oma?is la kuban gvidanton en la rusa ?efurbo.

Mi certas ke jen por la kuba popolo, jen por la rilatoj inter Kubo kaj Rusio, li faris multon pli ol kiu ajn personoj, esprimis Lavrov.

Fidel Castro en ?iuj aspektoj estis granda persono, eksterordinara personeco kaj tio anka? inkluzivas la kuban popolon, pri kiu li zorgis sian tutan vivon, kaj tiucele agis,  kaj planis, asertis la rusa gvidanto al la informagentejo Prensa Latina.

Tio inkluzivas universalajn valorojn kiel bezono pri libereco, pri la vero, la justico, klarigis la estro de la rusa diplomatio, depost subskribi la kondolencan libron en la diplomatia sidejo kuba en Moksvo.

?uste tio igis lin populara, krom lia volo nerompebla en la defendo de siaj vidpunktoj kaj senmortaj valoroj, kio havigis al li a?toritaton en la tuta mondo, li emfazis.

Fidel Castro estis en la komenco de la rilatoj inter Kubo kaj Soveta Univo, samkiel en la nuntempa Rusio, aldonis Lavrov.

Mi kelkfoje havis la ?ojon dialogi kun li kiam ankora? aktive laboris en 2004, kaj poste, kiam jam ne plu akvitis, mi vizitis lian domon kaj por mi tiaj dialogoj ?ajnas kiel se estus okazintaj hiera?, li emfazis.

La pasintan 13-an de septembro, Lavrov prezidis ceremonion en la ministerio rusa, kie oni prezentis la rusan version de la libro *Fidel Castro: gerilano de la tempo*, okazo en kiu li elstarigis la universalajn trajtojn de la kuba gvidanto.

Tiamaniere oni oma?is la 90-jaran naski?datrevenon de la Komandanto, kiel nomas lin la rusa popolo.

---

https://www.radiohc.cu/eo/noticias/internacionales/113708-fidel-homo-de-universalaj-valoroj-asertis-la-rusa-ministro-serguei-lavrov

Radio Habana Cuba